

LA DISTRO

2—a jaro

Marto—Aprilo

1951

„Der Zeltvertreib“ Eigentŭmer und Verleger: Wiener — Esperanto — Jugend; Herausgeber: Oesterreichische — E. Jugend. Verantwortlicher Red. H. März. Alle Wien I. Neutorg. 9. Druck: J. Marz Wien I. Freyung 1

H. SIRK

El la historio de nia lingvo

REPRESADO KAJ TRADUKADO KUN FONTINDIKO
PERMESATAJ

Pro la graveco de la sube presita parolado, kiun la aŭtoro dediĉas al la junaj gvidontoj de nia movado, la gazeto aperas en tia nekutima formo.

El la historio de nia lingvo

Parolado de H. Sirk, univ. prof-o, farita ĉe la Aŭstria Esperanto Kongreso en Linz la 13-an de Aŭgusto 1948.

KARAJ GESAMIDEANOJ!

Simile kiel pioniro vojaĝanta tra sovaĝa lando meditas dum tago de ripozo pri felice travivitaj danĝeroj por pli efike ilin spiti estonte, tiel ankaŭ ni esperantistoj ripozante de nia propaganda laboro meditu iom pri tempoj, dum kiuj nia lingvo travivis mortigajn danĝerojn! Ni lernos tiamaniere el niaj tiamaj eraroj eviti ilin estonte, eble baldaŭ estonte! Tiel ni ankaŭ obeos jenan konsilon de D-ro Zamenhof: „El la tempo pasinta, li diris, ni ĉerpu konsilon por la tempo venonta.“ Ĉi tiujn vortojn mi aŭdis el lia buŝo antaŭ ĝuste kvardek jaroj ĉe la kvara Universala Kongreso, kiu okazis en Dresdeno, tiam Esperanta Centro por Germanujo, en Aŭgusto de la jaro ok. Tiam nia lingvo estis ĵus travivinta la plej danĝeran periodon de la Idokrizo, pri kiu mi nun rakontos al vi.

Tiu danĝera krizo komenciĝis kelkajn monatojn antaŭ la kvara Universala Kongreso, nome en Oktobro de la Jaro sep. Ĝi estis kaŭzita per la intrigoj de la Delegacio, kiu ŝajnis antaŭ la esperantistoj havi influon ĉe la registaroj, per kiu ĝi povus oficialigi Esperanton. Sed antaŭ ol mi preparolos la intrigojn de la Delagacio, mi devas komencante de fore paroli pri ĝia fondo.

Ĉirkaŭ la jaro milnaŭcent la internacilingva afero estis nur malmulte konata de la mondo. Antaŭe, en la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento, la lingvo Volapük estis brueginta, gajnis kelkajn adeptojn kaj poste subite falis lasante al la publiko grandan seniluziigon kaj malkonfidon al la ideo de lingvo artefarita. Dum tiuj tempoj aperis multaj artefaritaj lingvoj inter ili la lingvo internacia de D-ro Esperanto en mil okcent okdek sep. Iom post iom Esperanto montris en la daŭro de pli ol dek jaroj sian superecon super la aliaj sistemoj, sed la publiko ne ankoraŭ regajnis la konfidon al la ideo de lingvo internacia, kvankam ĝi sentis ĝian bezonon ĉiam pli kreskantan. Tiam en la jaro milnaŭcent la fama franca filozofo Couturat, konata pro siaj esploroj pri Leibnitz, fondis ion, kio aspektis kvazaŭ internacia unuiĝo aŭ asocio kaj havis en franca lingvo la titolon: „Delegation pour l' adoption d' une langue auxiliaire internationale“, en nia lingvo Delegacio por la adopto de help-

lingvo internacia aŭ mallonge Delegacio. La celo de la Delegacio estis elekti la plej taŭgan el la diversaj artefaritaj lingvoj kaj poste rekomendi ĝin al la registaroj. Tion la Delegacio volis fari perante la plej altan sciencan aŭtoritaton, la Asocion de la Akademioj, ucedi la demandon pri la lingvo internacia. La Delegacio rezervis al si la rajton mem decidi, se la Asocio de la Akademioj malakceptus tiun taskon.

Ĉiu, kiu volis, povis aliĝi al la Delegacio per sia nura subskribo. Inter la subskribintoj oni trovis la nomojn de internacie konataj scienculoj kaj gravaj unuigoj. Sed efektive la Delegacio havanta nek regulajn kunvenojn nek elektojn reprezentis nur la personan opinion kaj la personan volon de Couturat. Certe la esperantistaj ĉefoj jam tiam ekkonis la blufan, malklaritan, por ĉiaj intrigoj taŭgan situacion; sed ĉar ili erare pensis, ke la Delegacio havos efektive influon ĉe la registaroj kaj ke ĝia rekomendo kondukos Esperanton al la fina triumfo, ili subtenis la Delegacion kaj kolektis multajn subskribojn por ĝi.

Intertempe Esperanto kreskis per nia pacienca kaj obstina laboro kaj gajnis la absolutan superecon super ĉiuj konkurantaj sistemoj, tiel, ke la vivo mem solvis la demandon, kiun volis solvi la Delegacio. Vi ja scias, kiel sukcesis en la jaro kvin la Unua Universala Kongreso en Bulonjo, kie nia lingvo montris tie sian vivantecon, kun kia entuziasmo la esperantistoj akceptis tie la Fundamenton, la eterne neŝanĝeblan bazon de nia lingvo savontan ĝin poste de la pereco! En la sama Kongreso oni ankaŭ starigis la Lingvan Komitaton, nian plej altan lingvan aŭtoritaton. Tiu Bulonja Kongreso malfermis la vicon da sukcesplenaj kongresoj. Laŭŝajne pro tiaj sukcesoj Couturat timis, ke Esperanto atingos sian celon sen la Delegacio kaj tio instigis lin al rapida agado. Li sekrete interrilatis kun Beaufront, franca ĉefo de la Esperantistoj, kiu havis pro siaj meritoj en la propagando ankaŭ grandan influon en la tutmonda Esperantistaro. Kiel karaktero li estis pro gravaj kaŭzoj ĉiam suspekta, sed la Esperantistoj vidis nur liajn meritojn kaj la grandan utilon, kiun ili ankoraŭ atendis de lia laboro. En sia gazeto l' Esperantiste, parte france, parte esperante skribita, li ĉiam lerte defendis Esperanton kontraŭ atakoj de scienculoj kaj kontraŭ ĉiaj reformprojektoj.

Couturat, tio estis formale la Delegacio, petis en la jaro sep apogite per subskriboj de 1250 universitataj profesoroj kaj 310 societoj la Asocion de la Akademioj elekti inter la diversaj sistemoj de artefaritaj lingvoj. Sed la Asocio de la Akademioj deklaris, ke ĝi estas nekompetenta en tiu demando kaj ke la vivo mem solvos la demandon pri liugvo internacia.

Nun la Delegacio povis laŭstatute mem decidi kaj elektis per blufa procedo komitaton, kiu kunvenis en Oktobro de la jaro sep en Parizo. Antaŭe oni jam estas rimarkinta kaŝitan, misteran agitadon inter la Esperantistoj. Komencante per blufa kritiko de la supersignitaj literoj oni sugestis renverson de la vortaro kaj de la Fundamento. Kiu kiel mi travivis tiujn tempojn, povus longe rakonti pri la memobservitaj intrigoj, sed por tio mankus nun al mi tempo. Al interesuloj mi povus private servi per karakterizaj ekzemploj.

Nun ni iru denove al Parizo, kie kunvenis en Oktobro de la jaro sep la menciita Delegacia Komitato por la elekto de la internacia helplingvo. Ĝi konsistis el dekkvar famaj scienculoj, inter ili Ostwald, internacie konata tre populara germana kemiisto, Jespersen, dana anglisto, Boudouin de Courtenai, pola slavisto. Nur tiuj tri viroj partoprenis la kunsidojn regule, la filozofo Boirac, rektoro de la Universitato de Dijon, konata Esperantisto, nur dufoje, poste li lasis sin reprezenti kiel ankaŭ la ceteraj membroj. Sed rektoro Boirac ĉeestis sufiĉe por doni sian kompetentan juĝon pri la procedmaniero de la Komitato. Li konstatis, ke la Delegacio estis tre lerte kombinita teatraĵo, kies scenojn du ĝis tri personoj direktis post la kulisoj. La Komitato diskutis kun la inventistoj de diversaj lingvoprojektoj, kies aŭtoroj povis plejparte veni Parizon. D-ro Zamenhof ne povis veturi tien kaj elektis Sinjoron de Beaufront kiel sian reprezentanton, ĉar li konis lin kiel lertan defendanton de Esperanto kaj nenion sciatis pri liaj perfidaj interrilatoj kun Couturat. Tiu ĉi estis eldoninta antaŭ la kunveno de la Komitato kritikon de Esperanto rilate la logikecon de la vortderivado, tio estas la vortfarado per sufiksoj kaj prefiksoj. Li estis ĵus eltrovinta la principon de la renversebleco en la derivado, trovis, ke Esperanto plej ofte, sed ne ĉiam obeas tiun principon kaj deziris, ke ĝia vortfarado estu ŝanĝata tiel, ke ĝi ĉiam obeus la principon. Krom tio li kritikis la supersignitajn literojn, kio necesigis ŝanĝon de la vortaro. Li kritikis ankaŭ la finaĵojn **oj** kaj **aj**, kio necesigis ŝanĝojn de gramatiko. Beaufront estis nun sekrete elverkinta lingvon, en kiu la kritikitaj punktoj mankis kaj Couturat prezentis tiun tute ne konatan, maŝinskribitan projekton sub la pseŭdonimo Ido al komitato, antaŭ kiu la nekonata aŭtoro havis la devon defendi Esperanton! Anstataŭ defendi Esperanton kontraŭ la kritikoj de Couturat Sinjoro de Beaufront nun defendis la projekton de Ido trompante tiel D-ron Zamenhof kaj la Esperantistojn unuflanke kaj la Komitaton aliflanke. Post oktaga laboro la Komitato deklaris fine, ke neniu lingvo povas esti rekomendata kiel tutaĵo, sed ĝi akceptis en principo Esperanton sub

la rezervo de kelkaj modifoj laŭ la projekto de Ido penante interkonsenti kun la Esperantista Lingva Komitato. Por tiu celo la Komitato elektis konstantan Komisionon konsistantan krom el Sinjoroj Couturat kaj Leau, lia kunlaboranto, el Ostwald, Jespersen kaj Baudouin de Courtenai. Tiu Komisiono aligis al si Sinjoron de Beaufront pro lia speciala kompetenteco!

Nun sekvas la danĝera periodo de la Ido-krizo. Ĉar la Komisiono intertraktis kun la Lingva Komitato tiamaniere, ke ĝi postulis respondon en templimo multe tro mallonga kaj misuzis sian situacion por ĉiuspecaj intrigoj ĉe la Esperantistoj kredigante, ke la „Relormoj“ tiel oni nomis la tute arbitrajn ŝanĝojn estis postulataj de multaj Esperantistoj, ke ili estis jam akceptataj de ĉiuj aliaj. Ĉiu, kiu praktike laboras en la propagando por Esperanto povas imagi al si, kiel terura estis tiam la situacio de la Esperantistaro! Fari propagandon por lingvo, kiun oni ŝanĝos baldaŭ en ankoraŭ ne konata grado aŭ anstataŭos per iu nekonata dialekto. Oni ne sciis, kiu estas Ido, kaj estis eĉ ema kredi konfuzite per la intrigoj de Couturat kaj Beaufront, ke Zamenhof forlasis la Fundamenton, kaj, ke li mem estis Ido! Kaj en tiu situacio oni devis prepari la Universalan Kongreson por Aŭgusto de la jaro ok! Kaj la Delegacio jam komencis en la ĉiutaga gazetaro reklami la novan lingvon! Subite nia propagando povus ĉesi kaj nia lingo falus rapide kiel Volapük, se la publiko gajnus la konvinkon, ke la lingvo ne plu havas Fundamenton. Ŝajnis esti la lastaj tagoj de Esperanto kaj aspektis kvazaŭ, ke ĉiuj niaj penoj kaj laboroj estus vanaj.

En tiu plej tetura momento de la krizo Zamenhof skribis en komenco de la jaro ok, la 18an de januaro, sian faman **Cirkuleran** leteron „Al ĉiuj Esperantistoj“. Li sciigis, ke li devis rompi ĉian intertraktadon kun la Delegacia Komitato kaj „lasis ilin flanke“ kaj, ke „ni Esperantistoj trankvile sekvos nian vojon“. Tio estis sentata kiel savo el mortiga danĝero. La reto de intrigoj estis disŝirata! Oni sciis, ke Zamenhof ne estas Ido kaj vidis vojon klaran kaj rektan antaŭ si. Nun oni povis jam pli trankvile prepari la kongreson en Dresdeno, kiu komencis la dekkvinan de Aŭgusto. Ĉe la Kongreso Zamenhof faris paroladon, kiun mi nun parte prelegos kaj komentarios. Li diris:

„En la daŭro de la lasta jaro en nia afero okazis faktoj, kiuj maltrankviligis por iom da tempo la mondon Esperantistan. Nun ĉio jam denove trankviligis. Nia arbo, pri kiu mi parolis en Kembriĝo en la pasinta jaro, montris sian tutan fortecon kaj sancon, ĉar malgraŭ la tute ne atenditaj atakoj, kiuj en la daŭro de kelka tempo kaŭzis grandan krakadon, la arbo konservis sian tutan potencon kaj perdis nur malmultajn foliojn“.

Ĉe la pasintjara kongreso en Kembriĝo nome Zamenhof komparis la esperanto-movadon kun arbo, kiu estas subtenata per cento da miloj da radikoj kaj radiketoj kaj ne timas la venton. Li daŭrigas:

„Malgraŭ la kaŝite preparitaj kaj lerte plenumitaj atakoj, kiuj ne donis al niaj soldatoj la povon dece orientigi kaj interkomunikigi, ĉiu el ili sur sia aparta loko staris forte kontraŭ ĉiuj forloĝoj kaj nur tre malmultaj lasis sin kapti per lertaj vortoj. Super la okazintaj faktoj mi povus sekve silente transiri al la tagordo. Tamen por gardi niajn venontajn batalantojn kontraŭ similaj surprizoj mi permesos al mi diri kelke da vortoj pri tiu temo. El la tempo pasinta ni ĉerpu instruon por la tempo venonta.“

Nun Zamenhof ne transiras tuj al la ĵus menciitaj okazintaĵoj, sed li komencas de tre fore, de la tempo, kiam li verkis kaj poste publikigis Esperanton en mil okcent okdek sep, kiel vi scias. Li diras:

„Pasis jam ĝuste tridek jaroj de la momento, kiam Esperanto unue aperis antaŭ malgranda rondo da amikoj; pasis jam dudek unu jaroj de la momento, kiam Esperanto unue aperis publike antaŭ la mondo. Tre malforta ĝi estis en la unua tempo, ĉiu plej malgranda bloveto povis ĝin renversi kaj mortigi, ĉiu bona vorto de la plej sensignifa homo aŭ de la plej senvalora gazeto donis al niaj pioniroj esperon kaj kuraĝon. Ĉiu atakanta vento kaŭzis al ili doloron. Kiam antaŭ dudek jaroj la Amerika Filozofia Societo volis preni le aferon de lingvo internacia en siajn manojn, tio estis por la aŭtoro de Esperanto tiel altega kaj ne atingebla aŭtoritato, ke li, kiu tiam havis ankoraŭ la rajton disponi pri Esperanto, tuj decidis fordoni ĉion al la manoj de tiu societo, ĉar estanta tute sensperta li tiam ankoraŭ ne sciis, kiu grandega diferenco estas inter teorio kaj praktiko.“

Feliĉe la entrepreno de la Amerika Societo ne sukcesis. Mi uzas la vorton „feliĉe“, ĉar efektive nun, kiam mi estas pli sperta, por mi estas afero tute senduba, ke se la entrepreno de tiuj teoriistoj daŭrus iom pli longe, la tuta ideo de lingvo internacia estus tute senkredigita kaj enterigita por ĉiam aŭ almenaŭ por tre longa, longa tempo.“

La Amerika Filozofia Societo angle: „American Philosophical Society“ estas tre grava unuigo de sciencistoj en la Unuigitaj Ŝtatoj fondita en la jaro mil sepcent kvardek tri de Benjamin Franklin mem. Ĝi estis ekzameninta Volapükon, malakceptis ĝin kaj starigis poste principojn, laŭ kiuj devus esti ellaborata la lingvo internacia, kiuj estis tre similaj al tiuj de Esperanto. Nur poste la Societo ekkonis la unuan broŝuron de D-ro Esperanto kaj vidis siajn principojn preskaŭ tute realigitaj, preskaŭ sed ne absolute. Tial ĝi volis nepre kunvoki specialan kongreson de la

plej kompetentaj fakuloj, kiu adaptu la lingvon al la teoriaj postuloj kaj Zamenhof konsentis. Tiam li ankoraŭ ne estis ligata al sia promeso neniam ŝanĝi ion en la lingvo. Tial li uzis en la parolado la vortojn: „La aŭtoro de Esperanto rajtis ankoraŭ disponi pri ĝi“. Tiu kongreso ne povis esti kunvokata, ĉar la invititoj ne montris sufiĉan intereson. Nur per tiu feliĉa hazardo, ke tiu kongreso malsukcesis, Esperanto ne pereis. Ni travivis tiel la mortigan danĝeron, ke Amerika teoriemo en bona kaj honesta intenco pereigus la lingvon internacian. Zamenhof konfesis en Dresdeno malkaŝe sian tiaman eraron, certe en la intenco averti kontraŭ simila danĝero, se eble en la estonto Amerika teoriemo endanĝerigus nian lingvon, eble helpata per granda amaso da dolaroj! El la konduto de Zamenhof, kiam li estis pli sperta, ni lernu la necesan sintenadon. „Ni lasu ilin flanke kaj iru trankvile nian vojon!“ devas esti nia devizo, kiun ni trovas en ia jam menciita Cirkulera letero de Dro Zamenhof kontraŭ la intrigoj de la Delegacio. Zamenhof daŭrigas en la kongresa parolado:

„Niaj pioniroj laboris kaj la afero kreskis. Baldaŭ ni ĉiam pli kaj pli akiradis la konvinkon, ke de teoriistoj ni devas atendi tre malmulte da bono por nia afero; ke ĉiuj laŭdoj kaj mallaŭdoj de flankaj personoj havas por ni nur tre malgrandan signifon, ke ni devas fidi nur niajn proprajn fortojn, nian propran paciencon kaj konstantecon; ke la mondo venos al ni nur tiam, kiam ĝi vidos en ni potencon, kiam ĝi vidos, ke ni ne perdas hodiaŭ, kion ni akiris hieraŭ, ke nia vojo estas klara kaj rekta kaj ni de ĝi neniam deflankiĝas.

Sed ne per unu fojo ni venis al tiu fortika konvinko. En la unua tempo vidante, ke nia afero progresas malrapide kaj malfacile, multaj Esperantistoj pensis, ke la kaŭzo de tio kuŝas en nia lingvo mem, ke, se ni nur ŝanĝos tiun aŭ alian detalon, la mondo tuj venos al ni en granda amaso. Tiam venis la periodo de granda postulado de reformoj“

Tio okazis ĉefe en la jaro naŭdekdu ĝis naŭdekkvar, kiam oni en la sola tiam ekzistanta gazeto „La Esperantisto“ diskutis pri ŝanĝoj en Esperanto. Memkompreneble ĉia propagando estis tiamaniere malebla. En la jaro naŭdekkvar la leganto de la gazeto fine decidis lasi la lingvon, kia ĝi estis. Tial diras Zamenhof daŭrigante:

„Feliĉe tiu periodo ne daŭris longe. La Esperantistoj baldaŭ konvinkiĝis, ke veni al ia komuna, ĉiujn kontentiganta kaj silentiganta interkonsento pri la esenco de reformoj estas tute neeble kaj la ekstera mondo, kiujn la reformuloj celis,

restis absolute indiferenta koncerne tion, ĉu tiu aŭ alia detalo havas en nia lingvo tian formon aŭ alian; oni baldaŭ konvinkiĝis, ke per reformado ni nur perdos ĉion ĝis nun akiritan kaj gajnos absolute nenion. Tiam la Esperantistoj fine decidis ne paroli plu pri iaj reformoj“

Ni ĵus vidis antaŭ niaj okuloj jam por la dua fojo gravan danĝeron, nome la halton de la propagando en la komenco de la naŭdekaj jaroj. La plejmulto de la Esperantistoj tiam decidis —bedaŭrinde nur post kelkaj jaroj—ĉesi la diskutadon pri ŝanĝoj kaj la pereiga danĝero ankaŭ ĉesis. Zamenhof daŭrigas:

„Kelkaj malkontentuloj forlasis Esperanton kaj kune kun kelkaj neesperantistoj, kiuj rigardis sin kiel plej kompetentajn en la afero de lingvo internacia komencis inter si ĝis nun ankoraŭ ne finiĝintan kaj neniam finiĝontan diskutadon pri diversaj lingvaj detaloj kaj ili staras nun sur tiu sama punkto, sur kiu ili staris antaŭ dekkvar jaroj.“

La malkontentuloj, pri kiuj parolis Zamenhof estis tiuj Esperantistoj, kiuj pro la decido de la plimulto ne plu paroli pri iaj ŝanĝoj forlasis Esperanton, la menciitaj neesperantistoj estis ĉefe eksvolapükistoj, kiuj pretendis havi mandaton de la volapükistoj kaj nomis sin Volapüka Akademio. Ili volis krei en komuna laboro internacian lingvon, Idiom Neŭtral, libere diskutante kaj voĉdonante pri ĉiu detalo. Ilia laboro havis nur la utilon, ke ŝi montris al la Esperantistoj, ke la labormetodo de la Volapüka Akademio estas utopio kaj kondukas al ne finiĝinta kaj neniam finiĝonta lingva diskutado.

Zamenhof daŭrigante en sia parolado mencias la grandajn progresojn de Esperanto post la ĉeso de la lingva diskutado kaj atentigas pri la natura evoluo, kiun montras Esperanto. Poste li daŭrigas:

„Nia afero trankvile kaj regule iras antaŭen. La tempo de teoriaj juĝoj kaj de kliniĝado antaŭ ŝajnaj aŭtoritatoj jam delonge pasis. Se iu nun esprimas sian opinion aŭ konsilon pri Esperanto, oni jam ne demandas, ĉu li estas homo grandfama aŭ ne oni nur demandas, ĉu liaj konsiloj estas konformaj al la naturaj bezonoj kaj la natura irado de nia lingvo aŭ ne. Se iu glornoma persono en plena nesciado de nia tuta afero esprimas iun el tiuj sensencaĵoj, kiujn ni jam tiom ofte aŭdis, ekzemple, ke la arta lingvo estas utopio, ke la esperantistoj sin reciproke ne komprenas k.t.p. aŭ se li, forgesante la nunan staton de Esperanto kaj la teruran ekzemplon de la Volapüka Akademio postulas, ke ni rebaku la tutan lingvon laŭ lia teoria recepto, tiam ni, Esperantistoj, indiferece ĉion aŭskultas kaj trankvile iras nian vojon.“

Ne por fieri pri nia forteco mi diras jenon: neniu el ni havas la rajton esti fiera; ĉar nia forteco ne estas la merito de iu el ni aparta, sed ĝi estas nur la rezultato de multjara pacienca laboro de multaj personoj. Se nin ne gvidus fera konstanteco,

nia lingvo jam de longe ne ekzistus kaj la vorto lingvo internacia estus nun la plej granda mokataĵo por mondo. La longa kaj malfacila batalado riin hardis kaj ne sole la voĉoj de apartaj personoj, sed eĉ la premo de la granda potenco nun jam ne povus deklini la Esperantistaron de ĝia klara kaj rekta vojo“.

Kaj nur nun Zamenhof venas al la Ido-afero per la vortoj:

„Kia do estas la kaŭzo, ke en la pasinta jaro en nia tendaro subite naskiĝis tia granda vento, kiu en la daŭro de momento minacis alporti al ni tiom da malbono? Kiu estis tiu ŝajne grandega forto, kiu por momento enportis tian neatenditan konfuzon en nian mezon? Nun kiam ĉio jam klariĝis, ni povas konfesi, ke ĝi ne estis ia eksterordinare granda potenco, ĝi estis simple kelkaj malmultaj personoj“

Oni nome en la tempo de la Kongreso, en aŭgusto de la jaro ok vidis jam pli klare rilate al la intrigoj de la Delegacio. Beaufront estis jam en Majo devigata konfesi, ke li estas la aŭtoro de Ido kaj poste oni ekkonis la tutan reton de la intrigoj kaj blufoj. Ne la 1250 universitataj profesoroj estis aprobintaj Idon, sed nur du personoj Couturat kaj Beaufront estis verkintaj ĝin kaj volis altrudi ĝin per trompo al la Esperantistoj kaj al la publiko. Nun Zamenhof donas sian juĝon pri tiuj du personoj:

„La danĝereco de ilia atako konsistis en tio, ke la atako ne venis malkaŝe el ekstere, sed estis kaŝite preparita kaj tute neatendite aranĝita interne de nia tendaro. Ĝi estas historio pri kiu mi volas paroli.“

Tiel Zamenhof evitas nomi la nomon de la perfidulo Beaufront, kiu pro persona ambicio endanĝerigis la tutan mondlingvan ideon. Poste Zamenhof transiras al la Lingva Komitato, kiu havas la devon gardi la ekstreman necesan kontinuecon en nia lingvo. Tiurilate li diras:

„Se tiu Komitato ŝajnos al vi tro konservativa, tiam memoru, ke ĝi ekzistas ne por la plenumado de diversaj personaj kapricoj, sed por la gardado de la intereso de la tuta Esperantistaro; ke pli bone estas, ke la Komitato faru tro malmulte, ol ke ĝi facilanime faru ian paŝon, kiu povas malutili al nia tuta afero.“

Tiam ankoraŭ necesis admoni la Esperantistojn, kiuj estis ĉiam ankoraŭ influataj kaj timigataj per la intrigoj. Tiurilate Zamenhof diras:

„Se iu diras al vi, ke oni devas ĉion krude rompi, se oni per ĉiuj fortoj kaj per ĉiuj eblaj rimedoj penas malkontentigi vin; se de la vojo de severa unueco, de tiu sola vojo, kiu povas konduki nin al nia celo, oni penas forlogi vin, tiam gardu vin! Tiam sciu, ke tio kondukas al malordigo de ĉio, kion multaj miloj da personoj atingis por la granda ĉiuhoma ideo per multjara pacienca laborado.“

Nun mi finas mian komenton de la Zamenhova parolado.

La Dresdena Kongreso brile sukcesis kaj la partoprenintaj Espe-

rantistoj adiaŭis kun la plena konvinko esti sur la ĝusta vojo.

Por lerni ion el la historio ni primeditu niajn tiamajn erarojn kiuj kunhelpis endanĝerigi la tutan mondlingvan aferon.

Nia ĉefa eraro, kiun ni estus povintaj eviti, estis la troa fido al la teorio kaj la kliniĝo antaŭ ŝajnaj aŭtoritatoj. Vivis tiam ankoraŭ kelkaj Esperantistoj, kiuj estis travivintaj la menciitan reformperiodon de la naŭdekaj jaroj, kiuj eble mem faris reformproponojn kaj devis ekkoni poste, ke ĉio tio kondukas al nenio krom al malutilo por la ideo de lingvo internacia same kiel la agado de eksvolapükistoj elverkantaj la lingvon Idom Neŭtral. Tiuj malnovaj Esperantistoj ne sufiĉe avertis la Esperantistaron kaj, se ili avertis, la Esperantistaro ne sufiĉe fidis al ili. Tio estis nia ĉefa eraro!

Alia eraro estis la rolo, kiun ni lasis ludi al flankaj personoj. Parte tiu malbonaĵo rezultis el tio, ke la grava Franca Societo por la Propagando de Esperanto konsistis plimulte el aprobantoj, el personoj, kiuj pagis volonte kelkajn frankojn por subteni aferon, kiu ŝajnis al ili utila, sed ili legis en la gazeto de Beaufront nur la francan parton kaj estis impresblaj per blufoj kaj fanfaronado pri universitataj profesoroj, gravaj membroj k.t.p., kiuj ĉiuj kune komprenis nenion pri Esperanto. Ofte tiaj aprobantoj havis grandan, kelkfoje malutilan influon ĉe la publiko.

Alia tipo de malutilaj Esperantistoj estis la ventkapulo. Li estas tre konata en kluboj per sia eterna agemo, kiu ĉiam kondukas al neniu rezulto. Tuj post la malsukceso de unu agado li komencas novan certe sukcesontan k.t.p. Kiam tia ventkapulo aŭdas ion pri proponoj de kontraŭfundamentaj ŝanĝoj, li ekbabilas, asertas, ke oni devas aŭskulti la opinion de eminentaj scienculoj, kiuj certe havas bonajn intencojn kaj la saman celon kiel ni, la ideo devas esti por ni kiel por Zamenhof la ĉefa afero, ke la problemo de lingvo internacia proksimiĝas al sia solvo k.t.p. Tiamaniere la ventkapulo malhelpas, ke ni lasu flanken laŭ Zamenhova konsilo en la Cirkulera Letero la homojn, kiuj ne lasas nin progresi sur nia vojo klara kaj rekta. Tiajn ventkapulojn oni tro longe toleris en la kluboj pensante, ke ili ne malutilos, ĉar ilia tuta agado estis ja ĉiam nur batado de vento, sed oni ne pripensis, ke, se temas pri lingvaj ŝanĝoj la de ili semita malkonfido, eĉ se ĝi ne kondukas al ia rezulto, estas tre malutila.

En la aŭtuno de la jaro ok la Esperantistoj reveninte de la Dresdena Kongreso hejmen forigis, se necese, la menciitajn malutilulojn el siaj kluboj kaj ebligis tiel denove poresperantan agadon. La malkontentuloj fondis Idoklubojn kaj klopodis malhelpi la progresojn de Esperanto. Sed vidante, ke tio estis

malebla. Ili serĉis la kaŭzon por tio en sia lingvo kaj tial tuj komenciĝis ĉe ili tendenco ŝanĝi Idon denove. La disfalo de Ido komenciĝis pli frue ol la Esperantistoj povis esperi. Jam en Marto de la jaro naŭ, idista ĉefo en Berlino, Seidel, publikigis Idon de li reformitan. Aliaj ĉefoj idistaj sekvis kun aliaj sistemoj, tiel ke la idaro de Ido pli rapide kreskis ol lia anaro.

En sciencaj rondoj tamen daŭris la influo de Ido pli longe. En Majo de la jaro naŭ aperis la libro: „Weltsprache und Wissenschaft“. Mondlingvo kaj scienco, kiu propagandis Idon. Ĝi estis verkita de Jespersen, la jam menciita dana lingvisto, kaj de kvar aliaj eminentaj sciencistoj nome Couturat, Ostwald, Pfaundler, aŭstria fizikisto, kaj Lorenz, svisa kemiisto. Ili sukcesis malhelpi la progreson de Esperanto en sciencaj rondoj. Mem ili atingis nenion, parte pro tio, ke kelkajn monatojn pli poste la fama kaj tre populara itala matematikisto Peano eldonis sian gazeton „Discussiones“. Ĝi estis skribita en la de li inventita lingvo Latino sine flexione kaj estis la organo de Academia pro Interlingua. Tiu Academia pro Interlingua pretendis esti la daŭriganto de la Volapŭka Akademio, kiu kelkajn jarojn antaŭe volis elverki la lingvon Idom Neŭtral. Academia pro Interlingua atakis kaj ridindigis la Ido Akademion, sed mem atingis ankaŭ nenion en sciencaj rondoj, por kiuj ĝi ĉefe volis verki.

Fine en la jaro dudekok la ĉefo de la Ido-Akademio, la ofte menciita Jespersen, elverkis sian propran lingvon, kiun li nomis Novial. Tio okazis en la jaro dudeka de la ekzisto de Ido!

Tiel efektiviĝis la profetaĵo de Zamenhof pri la ne finiĝinta kaj neniam finiĝonta lingva diskutado kaj la Idistoj, kiuj klopodis per ĉiuj rimedoj ridindigi la Esperantistojn antaŭ la publiko, fariĝis mem la plej granda ridindaĵo de la mondo.

Ni do vidas: La Idomovado, kiu estis komence gravega danĝero, ĝis kiam oni ekkonis, ke ĝi estas malplena ovo, evoluis fine en amuzan komedion.

La tuta komence danĝera aventuro kondukas nian rigardon al la gvida stelo en la nokta ĉielo, kiu diris al ni la direkton kaj savis nin de la pereco en la idista marĉo. Ĝi estas jena libro, la Fundamento de Esperanto, la eterne neŝangebla bazo de nia lingvo. Ĝi ankaŭ gvidas nin en la estonto kaj savos nin de la pereco, se la sorto ne ŝparigos al ni batojn similajn. Tiam okazos, kiel kantis nia Grabowski:

Se estos denove ventego, batal'
Ni estas jam bone harditaj.
L' esperon ne venkos la fajro nek ŝtal'
Nek ies perfidoj subitaj.